# Finu la besto-rimojn!

*Jen kvar-liniaj poemetoj pri bestoj. Sed pri kiuj bestoj? Ni ne scias, ĉar mankas la lasta vorto de ĉiu poemeto. Tiu vorto nomas la beston. Kompletigu la poemetojn!*

1. Senkrurulon vi rekonos
Precipe se ĝi sible sonos
Timo estos via sento
Je la vido de _________.

2. "Lakto bonas"
ĝi ronronas,
Mia ŝato
Estas _______.

3. Bojas ĝoje
Mordas foje
Sed sen vundo,
Jen la _________.

4. Granda, griza, se ĝi devas
Ĝi pezajn trabojn levas.
Per rostra eleganto
Kia besto: ____________.

5. Apud akvo, apud tero,
Ĉe la lago, ĉe rivero,
Sidas sur fortika kano,
Kvakas laŭte dika _______.

6. Fora kapo, longaj kruroj
Ĝi rigardas super muroj,
Por la alt-folia trafo
Taŭgas kolo de ________.

7. Ĝi alkuras tanko-peze
Korno nazo-meze.
Kiel buldozero
Granda _________.

8. Pendas de la arba branĉ',
Preta por la vosta lanĉ'.
Ni rigardas kun envio
Kiel saltas la _______.

9. Birdo ege mult-kolora
Vosto ĝia bunte glora
Pleniĝas ni per ravo
Je ekvido de la _____.

10. La loko de miel-substanc'
Ĝi per zig-zaga danc',
Komunikas, sen babelo,
Diligenta, la _________.

11. Saltas ĝi risorte,
Rapide, longe, forte,
Kun id' en ventra truo,
de aŭstralia _________.

12. Brilas ronde du okuloj,
Sonas klare tri ululoj.
Post la mus-arigo
Kontente dormas nokta _______.

13. Subite kuras, predon ĉasas,
Vore manĝas, ostojn lasas.
Poste kuŝas eĉ kun pigro,
Plurajn tagojn, stria _______

14. Besto flosas en la Nilo,
Decide dika la profilo,
Evidentas la vad-amo
De l' ____________

15. Unue henas, poste baŭmas,
Post la kuro, buŝe ŝaŭmas,
Inter montoj kaj ĉe valo
Galopadas la _________.

16. Pilkon sur la naz' balancas,
Dum ĝi pozas, prancas,
Glitas ĝi sur glata roko
Naĝilojn batas bela ______.

17. Kun bleko tondre muĝa
En bildstrio eĉ rozruĝa,
Sur la branĉoj, sur la tero,
Silente paŝas la _________.

18. Post mem-protekta preĝ',
Vizitu vi ĉe besta reĝ',
De vi restos eĉ ne ono
Post kontakto kun _______.

19. Verdulo el la marĉ' elvadas
Niajn klubojn ĝi invadas,
En kontraŭ-Esperanta stilo
Faŭke-blekas ___________.

**SOLVOJ :**

serpento, kato, hundo, elefanto, rano, ĝirafo, rinocero, simio, pavo, abelo, kanguruo, strigo, tigro, hipopotamo, ĉevalo, foko, pantero, leono, krokodilo.